


INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA PRI ĈIO,
KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON.



Sendu ĉion, kio rilatas al la
REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO
al W. NUTTERS, Ostadestraat 94, Amsterdam.
Nederlando.

ABONPREZO:
(Universala Poŝta Unuiĝo)
Jare: 1.40 Sm.; duonjare: 0,80 Sm.
Helpabono: Jare almenaŭ 4 Sm.

Viktimoj de militarismo dum pactempo.

El „Právo Lidu” (Popola Rajto).
Esperantigis E. B. LAJANSKIJ.

El soldata malsanulejo en Praha (Karlo placo) estis hieraŭ enterigata unu soldato. Landdefendara muziko akompanis lin ĝis la angulo de Sekala strato, tie oni fine ekludis al li. Poste ni aŭdis nur vipojn kaj galope kulantajn ĉevalojn kun ĉerko kiun ili veturigis supren al tombejo.

Simple afero, sed sanga tragedio!

Antaŭ kelkaj tagoj juna homo, nomita Seidl, praĥa ĉapelkomercisto, foriris por plenumi sian devon de milita ekzercado kiel rezervisto. Li forveturis al Benešov viva kaj sana. En Benešov estas iu leŭtenanto Trojanek. Tiu ĉi homo kondukis kompatindan Seidl al tombo. Tiu ĉi homo tridekkvarfoje pelis Seidl supren, sur ponteto, por ke li saltu el altaĵo de kvar metroj. La malfeliĉa rezervisto plendis kun kunmetitaj manoj, ke li ne povas plu salti, li petegis, ke li de tiu ĉi ekzercado estu liberigata. Sed Trojanek, severa oficiro, senkompata kiel la pesto, nepermesis kaj fine ordonis dejeti lin de la ponteto. Seidl, ĉe tiu ĉi falo rompis sian piedon kaj vundiĝis interne, kaj post nelonga tempo li mortis.

Por karakterizo de tiu ĉi ago ni ne havas sufiĉe da vortoj, sed ni scias, ke en konvenaj lokoj estos tia afero preparolata tute malkaŝe. Hodiaŭ ni sole povas konstati kelkajn pluajn faktojn.

La enterigo de malfeliĉa Seidl estis hieraŭ posttagmeze. Ĝi estis difinita por 3a horo de posttagmezo, sed intence estis preskaŭ je unu horo pli malfrue. Polico en civila kaj uniforma vestaĵo, ĉirkaŭigis la tombon ĉiuflanke. Inter la popolo aperis unu bone konata kamarado el Zizkov (Jizkov), kaj polica oficisto tuj, tute pala en la vizaĝo, alflugis al li, por sciigi lin, ke eĉ unu vorto ne estas permeseta paroli ĉe la tombo de mortinto, kaj ke ĉiu manifesto estos per ĉiuj rimedoj malebligata.

Oni elfosis kavon, kaj dum tombeja silento estis

Seidl enjetita en terĉirkaŭpreno. Jam li ne estos devigata de iu Trojanek salti el altaĵo de kvar metroj. Li sufiĉe estis saltanta, sufiĉe — per „saltomortale” — ĝis en la tombon!... kaj Trojanek sidas apud sia ĝlaso da biero en Benešov.

Ni ripetatas denove: La afero estas grava kaj ni postulas ĝian plej severan esploron. Silentigita ĝi certe ne estos — pri tio jam estas zorginta nia preso kaj niaj deputitoj.

Tie ĉi estas detruita vivo de juna homo, kaj la tuta publiko rajtas demandi, kiu estis kaŭzo de lia morto, kaj kion oni faros por liaj posteuloj. Mortigita Seidl estis edziĝinta — sekve: tuta familia vivo estas ruinigita, unu malespera edzino al mizero estas eldonita kaj unu patrino staras al la rando de frenezeco...

Neniu el liaj posteuloj estis atendita, ke la 31-jara viro, kiun ili kisis ĉe disiĝo kaj adiaŭis per „ĝis revido!” estos post kvar semajnoj jam en „Olšany” (praĥa granda tombejo).

Terura estas la fakto, ĉe kiu ni nun staras, kaj la respondaj militorganoj devas sciigi al la publiko puran veron kaj puni la krimulon. Horna vivo estas granda bieno sur la tero. Vivon de niaj laborviroj devas neniu altuŝi, nek tiran-sinjoregoj de l' supro, nek brutala mano de oficiro, kiu en la soldato vidas nur materion de malutila besto, eldonata al lia bona aŭ malbona pasio.

Ni tial laboru por socia justeco kaj ni protestu kontraŭ tia militarismo, kiu ne nur senĉese pligrandigas siajn postulojn kaj kondukas al bankroto, sed kiu pereigas kaj malriĉigas la popolon, kaj minacas la vivojn de laboristoj eĉ dum plena pactempo!

Oni devas doni al ni respondon, kaj se oni volus tiun ĉi respondon prokrasti, ni trovos rimedojn ĝin eldevigi.

Al estimata Higieno Garcia el Barcelona
dediĉas dankema,

E. B. LAJANSKIJ.

Al kamarado Hyams - Pri anarkio.

Anarkio estas la formo de socio en kiu estas nenia ĉefo, ĉiu individuo estante libera. Ne nur ĝi volas komunigi la produktrimedojn, sed ankaŭ la konsumrimedojn.

La anarkiistoj konsideras ke la socio estante la aro da homoj kiuj formas ĝin, por ke ia ajn socio estu bela, libera, estas necese ke la homoj estu bonaj, feliĉaj, liberaj.

La registaro, kiu ajn ĝi estas, ne povas doni feliĉon, nek liberecon al la individuoj, ĉar la leĝoj farataj estas nur bariloj por haltigi la liberan kreskadon de la individuoj, kaj ĝin restigi en la kadro kiu plaĉas al la registoj.

La devizo al laboro estas: „De ĉiu laŭ siaj fortoj, al ĉiu laŭ siaj bezonoj.“

La anarkiistoj neas la efikecon de la laŭleĝaj reformoj, kaj kontraŭbatalas la parlamentismon.

Por havi plenajn sciigojn, estos necese legi la verkojn de Kropotkine, Elisee Reclus, Grave, Bakounine.

Plie mi sciigas al la kamaradoj ke post 2 monatoj mi sendos al la redakcio tradukaĵojn pri tiu temo, nomitan „La Evangelio de Homo“. Ĝi povas esti publikigata kiel felietono, se tio estas ebla, ĉar ĝi estas iom longa. Tiel la kamaradoj povos konatiĝi kun anarkiismo pli konvene kaj la deziro de nia kamarado Nutters estos plenumata pri la socialista literaturo.

A. PANLOU.

Kelkaj membroj de „Liberiga Stelo“, sekcio de Sotteville, deziras korespondi p. k. kun eksterlandaj kamaradoj. Skribi al: Sekretario de Liberiga Stelo — ĉe la famille Laborieuse, Rue de Paris, Sotteville les Rouen (France).

Alvoko al ĉiuj kunlaboristoj.

La Franca Federacio de Industriaj Laboristoj por Gasa kaj Elektra Lumoj intencas fondi internacian federacion inter ĉiuj naciaj federacioj aŭ similaj organizacioj.

La celo estas krei amikajn interrilatojn por la financa kaj morala plibonigo de ĉiuj.

Por sciigoj, sin turni al samideano Maurice Claverie, ĝenerala sekretario de la Gasistaro en Parizo: Labora Borso (Bourse du Travail) 3 rue du Château d'Eau.

Karaj kolegoj kaj samideanoj de ĉiuj landoj, ne prokrastu sendi vian adreson kaj sciigojn por ebligi la starigon de tiu supre dirita entrepreno, kies sukceso ankoraŭ pligrandigos nian duoblan idealon: t. e. per Esperanto frateco inter ĉiuj laboristoj.

ATANAZO.

Socia Movado.

El Anglio.

La lokaŭto de la kotonlaboristoj finiĝis — en la stato de l' mastroj kaj laboristoj nenio ŝanĝis. La interrompo de l' produktado estis por la fabrikantoj

bona preteksto por tuj plialtigi la prezon de siaj fabrikoj; samtempe ili ege malfortigis la kason de la gelaboristoj.

La karboministoj balotis jene: striki 445000, nestriki 115000; tial baldaŭ la tuta karbindustrio en Granda Britujo haltos; la tuta rezervo de karbo en la lando nur sufiĉas por du semajnoj. La registaro diras, ke ĝi ne permesos la strikon. La ministroj ridas tiun minacon — kiel kapitalo foŝos karbon sen laboristo!

Certe, tio estas pli serioza problemo ol voĉdono pri „Dreadnoughtoj“.

Sed, kiu vivos, tiu vidos.

La Brita parlamento rekomencis sidadon post la libertempo. Laŭ kutimo la reĝo faris tronparoladon; ankaŭ laŭ kutimo li ne diris multon interesantan la laboristaron. Li ĝojis, ke liaj alilandaj rilatoj ankoraŭ restis amikegaj. Kaj li esperas, ke la rilatoj inter la mastroj kaj dungatoj pliboniĝos; post la „parolo de la trono“ oni kutimas kritiki ĝin. Kaj Sro Ramsey Mac Donald (laborpartiano) forte protestis, plendante ke la reĝo ne eĉ tuŝis la temon de malkara manĝaĵo kaj la troakosto de vivado inter proletarioj. La ĉefministro, Asquith, diris, ke la ĉefprojektoj estus dum 1912: 1e. la memregnado de Irlando; 2e. la malestablo de la Angla Eklezio en Kimrujo; 3e. la pligrandigo de la balotrajtoj.

La kuracistaro preskaŭ unuanime kontraŭstaras la asekuran leĝon kontraŭ la malsaneco, se ili nur estus mizeruloj kiel la laborista klaso, mi dirus „ili striku“. Ni vidas: kiam la rajtoj kaj privilegioj de la mezo-klasanoj estas minacataj, ili tuj eklektas. Ili lernas al ni la vojon, ni imitu ilin... Eble interesos la kunlegantojn, scii, ke en Anglujo oni ne povas interigi homan kadavron sen atestpapero de kuracisto; kaj la leĝoj devigas ĉiujn, kiuj havas la zorgon de malsanuloj, dungi kuraciston kaj pagi lin.

La karbministoj firme kaj unuanime favoras la strikon je la 1a de Marto, ĉiuj karbminejoj ĉesigas labori kaj tre verŝajne la fervojistoj simpatie strikos kun ili. La gloria sankta malkontenteco instruos la vojon al la treege bezonata socia revolucio.

JOHN HOYLE.

El Franclando.

La reakcia ondego. — Ian tagon kelkaj k-doĵ sindikatoj iris sur laborlokon kiu troviĝas apud Parizo. Tie laboristoj estis okupantaj sin aranĝi la relojn de l' fervojo.

La enirantoj deziris kontroli la kartojn sindikatajn, kiel tio okazas ĉiutage ĉe la federacio de l' domkonstruado.

Sed ili trovis antaŭ si individuon, kiu minacis ilin per revolvero, dirante: „Mi ne estas sindikato, kaj se vi alproksimiĝas al mi, mi mortpafas vin“. Tamen ili alproksimiĝis. Tion vidante, li pafis forkurante, sed ekspresvagonaro pasis rapidege kaj premeĝis la forkuranton.

Ĉiuj strikrompistoĵ — nomitaj tie ĉi flavuloj — de Parizo bruegis, kun la subteno de la gazetaro, dirante ke la ruĝuloj lin mortigis. Kuracistoĵ aŭtopsiis lin kaj

atestis, ke tio ne estis, sed ke li estas mortigita de la vagonaro.

Tamen malgraŭ ĉio niaj kamaradoj estas kulpigitaj. La proceso komencis la 18an de Januaro en Versailles, kaj resume jen la konkludoj de l' prokuroro.

„Sendube Merck — tia estas la nomo de l' flavulo — ne estas mortigita de la ruĝuloj; li freneze sin jetis sub la vagonaron, sed, se ne estis mortigo, la kulpigitoj estas tamen respondaj. Ili pri tio interkonsentis. La kulpigitoj estas krimuloj, ĉar se ili ne mortigis Merck'on, kiun ili ne konis, ili invadis la laborlokon kie troviĝis Merck precize je la ĝusta horo dum kiu ili sciis ekspreson pasantan sur la vojo, por forkurigi Merck'on por lin premeigi per la vagonaro”.

La 16 kulpigitoj estis kondamnitaj je 22 jaroj kaj 6 monatoj da malliberejo, 10 jaroj da malpermeso da restado 1) kaj 10.000 — dek mil — frankoj kiel kompensajoj.

La reakcia furiozeco estas tia, nune, ke ĉiuj malliberejoj estas plenaj je sindikatistoj kaj anarkiistoj. Ju pli ĝi estas terura, des pli la propagando disvastiĝas, ĉar ĉiuj ekscias.

La burĝaro baraktas kun la energio kiun donas la malespero.

Polica inkvizicio. — Pro atako al bankokolektisto, la polico ne trovante la kulpulon, sin venĝas kaj profitas la okazajn por persekuti la anarkiistojn. Ĝi arestas ĉiujn, kiu malplaĉas al ĝi, la individua libereco ne plu ekzistas, pruvoj ne estas necesaj, eĉ ilin ĝi ne serĉas.

En Parizo tuta kvartalo, en kiu loĝas multaj anarkiistoj, estas sieĝata de l' polico.

La kara Maroko. — La aldonaj elspezoj necesigitaj de militado en Maroko dum la jaro 1911a atingas la sumon de 58 milion 448.007 frankoj kaj estas tiel dividitaj:

Terarmeo . . .	57.673.968 fr.
Mararmeo . . .	774.039 „
Sume . . .	58.448.007 fr.

Kaj tie estas parolata nur pri aldonaj elspezoj. Plue tiuj ĉi estas necese efektive kalkuli ankoraŭ kun la elspezoj por zorgado de la soldatoj. Entute oni povas taksu ĉirkaŭe 100 milion la elprenon faritan el la monujo de la depagantoj dum la jaro 1911a por pagi la konkveron de l' teritorioj de kio, la profiton ricevos nur la bando Etienne'a aŭ la kapitalistoj Prusaj, Mannesmann.

Ĉu estas iu pli stulta ol franca depaganto?

(El „La Bataille Socialiste” de 2 Febr.)

Bela Striko. — En Parizo de multaj semajnoj la aŭtomobilkondukistoj strikas por altigi la salajrojn.

La polico kaj armeo estas, kiel kutime, je la servo de l' kompanioj.

Strikrompantoj estis dungataj, ili ne scias bone kon-

1) La malpermeso de restado estas: la devigo por la kondamnitaj loĝi en kelkaj difinitaj urboj. Li ne povas ilin forlasi. Jam tiu ĉi puno estis nur por la homoj kiuj vivas de la virinprostituado. Sed nun, ni progresis.

duki kaj vundas, premeigas la preterpasantojn, aŭ eniras en butikojn.

Ĉio estas farata sub la protekto de l' polico kiu tion toleras oficiale, dum ke speciala leĝo devigas, por konduki motorveturilon, havi specialan diplomon, kiun ne havas la strikrompantoj, sed ĉu bona protekto ne estas preferinda?

Niaj kamaradoj tamen sukcesos.

Kontraŭ la militistaj punlaborejoj. Antaŭ kelkaj jaroj juna soldato mortis en la Algariaj punlaborejoj. Lia nomo estis Aernoult.

Unu kamarado, Rousset, ankaŭ kondamnito, diris: Aernoult estas mortigita de la ranguloj, kaj rakontis en kiaj teruraj turmentoj li mortis.

La ranguloj juris sin venĝi kaj lin kulpigis de krimo, dum ili liberigis la veran kulpulon.

Anta militista juĝaro li estis kondamita je 20 jaroj da punlaboro.

Sed, jam de longe oni okupigis pri tiu heroo Rousset, kiu je danĝero por sia vivo kriis „oni mortigas viajn infanojn”. Kaj oni venigis la kadavron des Aernoult en Francujo, por organizi gravan manifestadon por postuli la revizion de l' Rousset'a proceso, kaj forigi la militistajn punlaborejojn.

Ĝi okazis dimanĉon 9an de Februaro en Parizo kaj 300.000 homoj sekvis postulante la liberigon de Rousset kaj la forigo de la punlaborejoj.

La burĝaj gazetoj provas diri ke ĝi ne sukcesis, sed ili mensogas kiel kutime.

A. PANLOU.

El Hungarujo.

La 29an kaj 30an de januaro tenis paroladon en Budapest dr. Adolf Braun el Vieno pri la tendencoj de laboristaj organizoj kaj pri la organizebleco de laboristoj. Braun laŭdis la germanajn, sed precipe la aŭstriajn organizojn kaj riproĉis la francajn sindikatojn, kiel la plej malmulte taŭgajn.

Ĉie ni vidas — li komencis la paroladon — en Japanujo, Rusujo, Sud-Afriko kaj Ameriko, ke la industria laboristaro sin organizas por plibonigi sian vivkondiĉon. Sed la movado ĉie prenas alian formon. La organizado havas tri ĉefajn tipojn: la anglan, germanan kaj la francan. La unuaj laboristaj organizoj: la malnovaj „trade unioj” fondiĝis en Anglujo. Ilia plej karakteriza trajto estis, ne zorgi pri la politika edukado de la laboristoj. Ili estis severe apartigitaj korporacioj, kiuj zorgis nur pri la interesoj de siaj propraj fakoj. Tial la movado estis malforta kaj senpova malgraŭ tio, ke en la organizoj estis multego da laboristoj. Sed la anglaj organizoj dum la lastaj tempoj daŭre ŝanĝiĝas. Ili jam rekonis la vojon, kiu kondukas al la renovigo de la socio.

La spirito de la germanaj organizoj devenas el Anglujo, kvankam tion hodiaŭ jam oni ne povas rekonu, ĉar la germanaj organizoj jam superas la anglajn. La germanajn organizojn karakterizas la forta centralizado, la helpado de la membroj kaj la daŭra konstruado de la organizoj. Nur tiu ĉi trieca klopodo klarigas al ni la glorau venkon, kiun la germanaj samideanoj atingis antaŭ kelkaj tagoj de la elektado de la deputitoj.

La aŭstria kaj hungara fakorganizado sekvas la ekzemplon de la germanoj. De ili ni lernis, ke la unueco plimultigas la batalpovon. La malgrandaj fakoj mem ne povas sukcese batali kontraŭ kapitalistoj, sed se ili aliĝas al grandaj organizacioj, tiam ili fariĝas nevenkeblaj. Tio ĉi estas la plej moderna nuanco de la organizado.

La tria tipo de laborista organizado estas la franca, la tielnomata sindikalista movado, kiun karakterizas la forte akcentita „action directe” (senpera agado). Tiu ĉi nuanco montras nenian parencecon al la aliaj organizaĵoj. La anoj de tiu ĉi movado nur per temperamento kaj fantazio volas venki la kapitalismon. Estas vere, ke la laboristaro bezonas ankaŭ temperanton, sed la ĉefkondiĉoj de la organizado tamen estas la trankvileco kaj antaŭvido! Sed tiuj ĉi estas tute nekonataj ĉe la sindikalistoj. La sindikalistoj malbone taksas la aferojn. Ne la konsekvenca edukado de laboristoj, sed la flegado de revoluciema spirito kaj la proklamado de ĝenerala striko estas iliaj ĉefaj bataliloj. Se ni nun de tie ĉi ekirus al la urbo kaj ĉie ni vivigus la ĝeneralan strikon, certe ektimiĝus la burĝaro, amasiĝus la homoj kaj fariĝus granda tumulto. Sed se ni tago post tago ripetus tion, tiam ĝi fariĝus kutimita kaj neniu timus ĝin. La francaj sindikalistoj post ĉiu kunveno vivigas la ĝeneralan strikon. Komence ektimis la francaj kapitalistoj, sed hodiaŭ jam neniu timas tiun batalon, oni al kutimiĝis kaj ne akceptas ĝin serioza. Sed oni ne konsideras serioza la francan organizadan movadon ankaŭ. Kaj tio ĉi estas granda malfeliĉo. Al la armilaro de sindikalistoj apartenas ankaŭ la sabotado (difektado de laboriloj kaj produktajoj). Sed per tio ili neniam atingos la celon, ĉar la kapitalisto tuj maldungas la difektantan laboriston kaj ĉio restas en la malnova stato. La francaj sindikalistoj ne povas helpi la maldungitan laboriston, ĉar iliaj kasoĵ ĉiam estas malplenaj. En la kontraŭ-kapitalista batalo ni bezonas ne nur temperanton, sed unuavice plenan kason.

Pri la organizebleco de laboristoj li diris, ke pli facile organizeblaj estas la inteligentaj laboristoj, ĉar ili pli komprenas la utilon de la organizacio, ol la malpli inteligentaj. Malfacile oni povas organizi la virinajn, helpantajn (neprofesia) kaj maljunajn laboristojn; precipe tiujn, kiuj havas proprajn domojn aŭ malgrandan teron. Plej facila kaj utila estas la agitado ĉe la ekssoldatoj junaj. La militarismo laŭ la vidpunkto de disciplino estas bonega edukilo, ĉar la laboristo fariĝas pli serioza! La plua edukado jam poste apartenas al la organizaĵo.

La redaktistaro de iu burĝa gazeto ekstrikis, ĉar la posedanto ne volis plialtigi la salajron. Sed ili jam alitage konsentis en 15 % plibonigo de salajro.

La Budapeŝtaj maŝin-fabrikistoj decidis elŝosi ĉiujn laboristojn la 24an de februaro, ĉar en fabrikejoj estas malkonsento inter la fabrikistoj kaj laboristoj. La konflikton kaŭzis plej ĉefe la fertornistoj, kiuj malgraŭ tio, ke ili estas la plej bone pagataj inter la ferajistoj, tamen en multaj fabrikejoj ne estis kontentaj. Multe da mono ili elspezis por si el la komuna strikkaso. Pro tio inter aliaj fakaj ferajistoj (maŝinmuntistoj, forĝistoj k. a.) estas iom da antipatio kontraŭ ili. La laboristaj gvidistoj ĉion ekfaras por eviti la lokaiton, sed la kapitalistoj ne volas trakti kun la laboristoj. Ili postulas plenan subigon.

SINCERA.

Lasta novaĵo. — La maŝin-fabrikistoj kaj laboristoj interkonsentis, sekve la lokaito ne okazos. La laboristoj iris ĝis la plej lasta fino de la cedemo.

S.

El Italujo.

La Milito Itala-Turka. — Ne ŝajnas vere, ke en la dudeka jarcento ekzistas ankoraŭ la barbareco, la sovaĝeco kiu regadis en la mallumaj kaj nigraj tempoj de Borgia.

Estas absurde, malnoble, ke miloj da laboristoj, miloj da homoj mortigas unu la alian, nur por kontentigi la sovaĝajn dezirojn de reĝoj, imperiestroj k.t.p. La milito estas sovaĝaĵo, kiu dissemis kaj dissemas inter la homaro mizeron, doloron, malprogreson.

La milito estas la oferbuĉado de la popoloj, post la ekspluatado en la laborejoj kaj sur la kamparo, je la nomo de la patrujo, kiun ili ne havas, ĉar por la laboristoj la patrujo estas la tuta mondo, kaj la mal-amikoj ne estas la laboristoj de aliaj landoj aŭ nacioj, sed la ekspluatantoj kaj mortigantaj kapitalistoj.

La milito estas la teruro de la malriĉaj kaj... la prospero de la reĝoj, bankistoj kaj aliaj samaj parazitaj kapitalistoj.

En tiu ĉi Eŭropo armata ĝis la dentoj kaj putra ĝis la ostoj, kie oni diras ke „civilizeco” regas, Italujo ankaŭ volis doni ekzemplon de malprogreso, malnobleco kaj barbareco.

La sangsoifa registaro amasiĝis preskaŭ la tutan juncon, la esperon de multaj gepatroj, la subtenantojn de multnombraj familioj, por ilin mortigi en la dezertoj de Tripolitano! Kiom da larmoj, kiom da malespero, kiom da malĝojo akompanis tiujn infanojn, por kiuj iliaj gepatroj faris sennombrajn oferojn.

Tiuj malriĉaj laboristoj maljuniĝintaj antaŭ la tempo per malĝojo kaj mizero, ne havos helpon, ne havos subtenon dum siaj lastaj tagoj...

Multaj gepatroj ne havos tiun sorton, multnombraj familioj povos ankoraŭ ĉirkaŭpreni siajn infanojn, sed... se iom da konscienco ili havas, interne ili pensos ke ili ĉirkaŭprenas kaj kisas krimulojn, mortigintajn siajn fratojn!...

Ĉu ne la Turkojn, la Arabojn kaj la tutan laboristan mondon kunligis sama ĉeno da suferoj, maljustecoj kaj mizeroj?...

Certe, la friponoj de la putra Itala monarĥio ne kortuŝiĝis per la barbarajoj kiujn ili fariĝis en Tripolitano. Ĉio tio estas hereco de la milita monstro, de la mortigantaj kaj orsoifantaj kapitalistoj, kiuj je la nomo de la patrujo — tiu patrujo kiu nur havas mizeron kaj malsaton por siaj gefiloj — ordonas la plej barbarajn krimojn.

La tuta civilizita mondo havas senton de protesto, la tuta liberala mondo vomis la plej amarajn malaprobajojn kontraŭ la barbaroj, kontraŭ la rabemaj regantoj, sed la Italiaj socialistoj kaj sindikatistoj nenion faris. Ili estis kaj estos (sub la protekto de Turati'o, Bissolati'o, Quaglino'j, Treves'o k.t.p.) okupataj en la parlamentkuirejo kaj forĝis ke en Tripolitano okazis buĉadoj.

Neniu protesto: afero kiu montras al ni, ke Italujo estas ankoraŭ (kiel multnombraj nacioj) sub la bruta milita reakcio, sub la ordonoj de la reĝo Vittorio IIIa kaj Giolitti.

„En libereco paco” ni diras. Kaj antaŭ la vizaĝo de tiuj prirespondantoj ni krias: „Mortigantoj!”... Ni, liberuloj, venĝos ĉiujn viktimojn de la militoj la tagon je kiu ni faros la socialan revolucion!...

Germinal!...

AMPELLIO PAZZINI.

Kelkaj Respondoj.

En la decembra numero oni legis artikolon titolitan: „Ĉu la anglaj socialistoj estas religiaj?” de nia k-do Hoyle. Li protestas kontraŭ la econ religian, kiun mi donis al la anglaj socialistoj. Mi diris ankaŭ ke ekzistas esceptoj, ĉar mi konas kelkajn socialistojn *nereligiajn*. Se mi tion diris, tio ne estis sen atestoj de k-do kiu suface bone konas Anglujon, loĝantaj aŭ loĝintaj en tiu lando.

Oni diris al mi ke kontraŭreligia propagando estas la plej severe haltigata. Anglo kiu paroladis kontraŭ la religio estas kondamnita je monato da malliberigo.

Hoyle diras: „Ni nebezonas kontraŭbatali la religion ĉar ni ĝuas religian liberecon. La pastroj invitas la laboristojn socialistajn kaj anarkiistajn kiel parolantoj en la preĝejoj.”

Mi ne scias ĉu tio okazas ofte kaj ĉu tiaj paroladoj ricevas grandajn rezultatojn.

Kio estas religioj? La malo de libera penso, de libera ekzameno.

Pro tio mi ne komprenas kial la anglaj socialistoj ne kontraŭbatalas ilin. Mi esperas, ke iam kompetentulo montros al ni ĉion, kio povas instrui nin pri tio. Mia flanko mi serĉos lin.

Pri „Liberiga Stelo” nia k-do Padfield demandas: „Ĉu ĝi estis fondata laŭ internacia decido? Ĉu la statutoj estas diskutitaj kaj starigitaj de internacia komitato? Ĉu la spirito kaj celo de „L. S.” estas internaciaj?” kaj li konkludas dirante ne.

K-do Padfield estas tute prava. Sed, ĉu asocio internacia estas ĉiam fondata laŭ internacia decido? Mi ne kredas. Iu grupo iniciatas pri io, serĉas partianojn en ĉiu lando, invitas ilin fondi sekciojn kaj poste, se bezonas kaj se oni povas, oni organizas internacian kongreson, en kiu oni diskutas pri la tuta programo.

Ni ne povis internacie kunveni, do ni alvokis ĉiujn aliĝi nian organizadon, konigante per cirkuleroj nian celon.

Ni ricevis multe da aproboj, kaj antaŭ unu monato ni ricevis leteron de rusa k-do, diranta: „Ricevinte la statutojn kaj alvokon al tutmonda internaciistaro, mi konkludis ke estas la unua esp. unuiĝo celanta laŭ deca vojo. Sekve mi petas la sekretarion akcepti min kiel membron de tiu societo kaj sendi cirkulerojn por disvastigo.”

Tiamaniere ni estas certaj havi en nia internacia asocio k-dojn samopiniajn.

Se post pripensado oni vidas ke la rezultato estas sama, kvankam oni agadis alimaniere, ĉu oni ne povas poste diskuti la diversajn punktojn kiuj formas la statutojn?

Kiam eksterfranclande mi ricevis sciigojn pri fondo de sekcio de „Liberiga Stelo” la iniciatulo skribis: „K-do, mi organizis kunvenon por niaj esp. k-do. Mi legis *viajn statutojn*, kiujn oni aprobis, kaj oni decidis fondi sekcion.” Tio laŭ mi estas klara. Tiam mi neniam ricevis el Anglujo. Kial!

Tamen oni diris al mi ke la ligo de esp. socialistoj ekzistas.

Padfield diras ankaŭ: „Anarkiismo (aŭ socialismo), pacifismo kaj kontraŭreligiismo, ŝajnas al mi tuta franca”. En niaj statutoj ne ekzistas *pacifismo*, ĉar en Franclando la burĝoj nur estas pacifistoj kiel Nikolao IIa la pendigisto de ĉiuj Rusoj. Ĉi tie la veraj pacifistoj estas la kontraŭmilitaristoj. Sed efektive en Franclando kiel en multaj aliaj landoj (mia multjara korespondado tion konigis al mi), socialisto estas kontraŭmilitarista kaj kontraŭreligia. Religio kaj socialismo ne povas kuniĝi kaj la fama parolisto Sébastien Faure diris: „Se mi devus skribi pri kristana socialisto mi skribus: Socialisto (?) Kristano”.

Mi opinias ankaŭ ke forta organizado pri ĉiu afero pli rapide efikus. Sed oni estas certaj trovi en ĉiuj ligoj la samajn homojn, supozante ke ili estu sufiĉe riĉaj por aliĝi ĉiujn.

Mia longa sperto aŭkaŭ montris al mi ke internacia ligo de ruĝuloj ne devas efektiviĝi laŭ vortoj: *anarkiistoj, socialistoj, liberpensuloj*, sed laŭ programo, ĉar tiuj vortoj ne havas saman signifon en ĉiuj landoj. Mi finos ĉi tiun tro longan respondon, admonante ĉiujn aliĝi al „Liberiga Stelo”, kaj fondi sekciojn en siaj landoj.

R. LOUIS.

Pri kaj por la virinoj.

-Patrino-lakto aĉetebla! — La germana revuo „Publika Higieno” enhavis antaŭ nelonge jenan komunikadon: „En la hospitalo por infanoj en urbo Kiel, doktoro Starck post longa eksperimentado sukcesis nutri ĵus-naskiĝintojn per lakto prenita de suĉigantaj virinoj. La rezultoj estis bonegaj, kaj Dr. Starck nun klopodas fondi virinolaktejojn, kie malriĉaj virinoj povas vendi sian lakton, kiun oni poste bonpreze povas liveri al virinoj de „pli bona” socia stato, kiuj mem ne deziras suĉigi sian infanon. Jen do bona okazo por tiaj malriĉulinoj gajni iom.”

Do: mem la patrino-lakton oni volas depreni de la popolinferoj! Oni trovis rimedon por ĝin ŝanĝi en komercaĵo, kaj la infanoj el la popolo devos sin kontentigi kun iu anstataŭaĵo, eĉ de post la unua tago de sia nigra ekzistado. Ĉio por la monposedantoj, por la proletarioj: defalajo kaj imitaĵoj!

Ni scias, ke jam ekzistas nutristinoj — malriĉaj virinoj, kiuj, perdinte propran infanon, aŭ eĉ je malprofito de la propra infano, suĉigas por mono la infanon de riĉulo. Sed, en tiu kazo, ekzistas almenaŭ

certa ligilo inter suĉigistino kaj la suĉinfanon: ŝi konas ĝin, eĉ povas ĝin ami. La rilato ne estas nenatura.

Sed, nun tio fariĝos ordinara komerca afero — oni simple malplenigos la mamojn de la virino; ŝi eĉ ne scias por kiu infano; oni pagos tiom po tiom, kaj la virino povas foriri. La nutraĵo, kiun preparas sia korpo por la propra infano, fariĝos vendajo; la virino liveros lakton, same kiel bovino.

Jen la plej nova honto farita de civilizeco kapitalista al la virino kaj al patrineco.

En ĉiuj landoj la socialistoj postulas: patrinec-asekuron, t. e. elpago de l' plena salajro je nasko, flego senpaga en la propra hejmo, premio por virinoj suĉig-antaj, fondo de kuirejoj por suĉinfana nutraĵo. Unu vorte, socialismo deziras ke patrineco refariĝu ĝojo anstataŭ pliigo de mizero kaj de humiligo.

Forĝistinoj. — En cirkaŭajo de Birmingham (Anglio), precipe en antaŭurbo Cradley Heath, ekzistas dum centjaroj laciga, malaltpagata hejmindustrio: forĝado de ĉenoj. Kun tio okupas sin pleje la virinaj membroj de la familioj — la avinoj, edzinoj, filinoj. Ĉar la viroj trovas laboron pli bone pagatan en la minoj cirkaŭ Birmingham. En domo post domo ĉenoj estas forĝataj de kalikkovritaj virinomanoj, je labortagoj tre longaj. Kaj per tio apenaŭ buŝpleno da pano estas gajnebla.

Anguleto de l' eta loĝejo estas aranĝita kiel forĝejo ne tre komplika. Dum laborsemajno de 66 ĝis 72 horoj, unu virino povas forĝi 50 kilogramojn da ĉeno. Por tio ŝi ricevas 4 Sm. Sed ŝi devas mem pagi la ilojn kaj bezonajojn (hejtajo k.c.). En Cradley Heath estas ± 800 tiaj forĝistinoj; inter ili estas momente 20 80-jarulinoj, kiuj ankoraŭ ĉiutage forĝas centojn da ĉeneroj.

Ĉirkaŭrigardo.

Jen kion Gustave Hervé skribis en sia ĵurnalo „La Guerre Sociale” (La Socia Milito):

„En tiu ĉi gazeto mi multfoje mokis germanan social-demokratian. Mi kredas, ke iam mi estas dirinta, ke nenio ĝi estas ol elekto- kaj kotizajo-maŝino. Tamen, deŝt ĝiaj grandecaj demonstracioj kontraŭ milito, pasintsomere, dum ke en bruema Francujo nenio okazis — kaj deŝt ke mi ekkomprenis, ke tiu giganta elekto- kaj kotizajo-maŝino ŝatempe sin scias transformi en potenca maŝino kontraŭ la imperiestro kaj liaj helpantoj — de tiam mi ege deziras, ke ni ankoraŭ posedu tian maŝinon.

La masivaj regimentoj germanaj de soc.-demokratia almarŝas metode; ili faras nenian neprudentaĵon; ili ne faras erarajn monovrojn; ili okupas urbon post urbo kaj vilaĝon post vilaĝo. Estas nova imperiestra Sedan, kio preparas sin, kun nova respubliko germana kiel tuja rezulto.

La imperiestro ĝin scias. Li scias ankaŭ, ke tuteŭropa milito je tiu ĉi momento nur akcelus tiun solvon.

Tiel la venko de soc.-demokratia je la regno-elektoj ne estas nur venko de l' germana libereco, sed samtempe de l' mondopaco.

La germanoj starigis belegan rilaton inter partio kaj metiomovado, kaj per tio donis al la germana laboristklaso du potencajn organizaĵojn, politikan kaj ekonomian, kiuj marŝadas kune; ili plie sukcesis doni al germana popolo kredon en si mem, entuziasmon, kiu scias translokigi montojn.

Ni, francoj, kontraŭe, inter cirkonstancoj multpli favoraj, ni, pro nia interna malpaco, per niaj senfruktaj interdisputoj pri

personoj, pri sektoj, pri formoj, trovis la rimedon doni al ni partion kaj metiomovadon, kiuj ambaŭ staradas senmove; kiuj havas ridindajn monrimedojn, kasojn sen unu centimo kaj gazetojn sen legantoj.

Vere, mi ekdemandas al mi, ĉu ni, kun niaj grandaj vortoj pri ribelo, direkta agado, sabotado, en revolucia vidpunkto ne devas nin konsideri kiel malgrandaj knaboj kompare al la germanaj elekto-socialistoj?”

28an de Januaro okazis en Harlema la trideka jarkunveno de Nederlanda Ligo Novmaltusiana. Partoprenis 26 deligitoj el 12 lokaj sekcioj. La prezidantino, S-ino Rutgers-Hoitsema el Hago, konstatis en sia malferm-parolado, ke la Ligo, malgraŭ multflanka rezisto, kontentige prosperas. Laŭ la jarraporto, la nombro de l' membroj saltis pasintjaron de 2861 al 3388. Kvar novaj sekcioj starigis. Multaj familioj sin turnis al la Ligo por informoj; multaj malriĉaj virinoj ricevis de la Ligo helpon senpagan. La Ligo akceptis la invitojn pri partopreno al la intern. kongreso por rasbonigo; al la 4a intern. kongreso de Novmaltusianismo, kaj al la 1a intern. kongreso por patrineca ŝirmado kaj reformo de l' priseksa moralo, ĉiuj tenitaj pasintsomeron en Dresden, dum la higiena ekspozicio tie.

Jen kiel ploras holanda organo katolika pri la falo de Kolonjo dum la germanaj elektoj:

Breĉo teruriga estas pafita en la honorinda, ŝajne neprenebla Centro-turo!

„Das alte heilige Köln (grandaĝa, sankta Kolonjo), Romo de Germanio, kie estas preskaŭ alterne domo kaj preĝejo, falis kiel viktimo de socialdemokratio. La tago, je kiu ĝi falis, estas „dies ater” (nigra tago) en la katolika historio. En la fokuso de katolika inteligenteco kaj de multjarlonga socia laboro, la partio de la renversemoj plantis la ruĝan standardon!”

La striko de l' anglaj ministoj, kiu eble estos komencinta, kiam nia Marta numero aperas, okupis pasintmonate ne nur tutan Anglion, sed ankaŭ aliajn landojn. Oni scias: kiam la anglaj laboristoj organizitaj anoncas ekonomian militon, tiam estos milito. Ĉiuj artikloj de la universala komerco: la fero, la kotono, la grenoj k.t.p. jam sentis la influon de tiu striko, kiam la mondo ne vidis ankoraŭ. La prezo de karbo jam ege altiĝis — la minposedantoj per tio jam supergajnis proksimume tiom kiom postulas la ministoj. Oni kalkulis, ke la kaso de l' strikantoj enhavas 22 miliojn Sm. Tiu sumo ebligus strikon de unu monato. Striko de unu monato havus por Anglio sekvojn pli gravajn ol milito perdita.

Tiu striko, se ĝi okazos, certe ne malsukcesos pro strikrompado — estas sendube neeble, anstataŭi milionon da laboristoj.

Ĉu vi scias, kie estas nia papago?

El „Ĉas” (Tempo) tradukis Em Batek, Riĉany. „Právo Lidu” 23an de Januaro sciigis: Bohema reĝo Ferdinando, kiu mortis en Praba en j. 1875 ordonis, ke lia amata papago plue estu zorgeme gardata kaj por tiu celo, t. e. por nutraĵo kaj flegado, estu 50 K. monate elspezota.

Por ni estas enigmo en tio: ni certe scias, ke tiu ĉi elspezado po 50 K. monate ankoraŭ estas pagata. Sed ni ne scias, ĉu tiu papago de bohema reĝo Ferdinando ankoraŭ vivas, aŭ ĉu estas jam el tiu ĉi prizorga legato alia papago nutrata aŭ ĉu eble oni anstataŭ papago el la 50 K. monate flegadas alian beston?

Laŭ Brehm atingas kelkaj papagoj altan aĝon, ĝis 300 jaroj; sed la papago de Ferdinando Dobrotivj

Bibliografio kaj presaro.

Vortaro de la oficialaj radikoj de Esperanto de E. Boirac. Prezo 0 50.

Eliro, dua libro de la biblio el la originalo tradukis Dro L. L. Zamenhof. Prezo 2.

M a z e p a, tragedio en kvin aktoj, de Juljusz Stowacki el la lingvo pola tradukis A. Grabowski. Prezo 2.

Halka, opero en kvar aktoj de S. Moniusko por la muziko kaj W. Wolski por la teksto, el la lingvo pola esperantigis A. Grabowski. Prezo 1.

Tiuj 4 verkoj ĉe la librejo Hachette kaj Kio.

Poŝtkartoj esperanto — Paris, unua serio, vidaĵo de Paris, kun klariga teksto en Esperanto. La serio de 12 poŝtk. afrankite 0 55 ĉe la Presa Esperantista Societo, 33 Rue Lacépède en Paris.

Esperantista Poŝkalendario 1912. Redaktita de Dro A. Schramm, reĝa asesoro, Dresden Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin, 0,500 Sm. afrankite (por Germanujo 0.450 Sm.).

Pri Esperanta Literaturo, parolado de Edmund Privat, prezo 0 75 ĉe Hachette kaj Kio en Paris, 79 Boulevard St. Germain.

Oficiala Jarlibro de U. E. A., por 1912: prezo 50 Sd.: Genève. 10 rue de la Bourse.

Kulturceladoj de la nuntempo, de prof. dr. Aug. Forel, trad. dr. Fr. Uhlmann. Universala Esperanta Librejo, Genève, 10 rue de la Bourse.

La Krimoj de Dio, de Sébastien Faure, fama franca paroladisto. Tradukita de L. Carlos kaj F. Buskin. Ilustrajo de L. Rodo. Prezo: 0.25 afrankite ĉe „Pavo-Libereco”, 49 Rue de Bretagne, Paris.

Diversaĵoj.

Karaj kamaradoj! Nia Revuo intersanĝas kun ĉiuj konataj aliaj Esp. gazetoj kaj organoj. Tiuj ĉi ne multe atentis nin. Pruvo: ili sendas ekz. ankoraŭ al la antaŭa administranto, kaj eĉ al ties malnovaj adresoj! Kvankam ĉiu sanĝo de adreso je ĉiu nur ebla maniero al ili estas anoncata!

Nu; vi, kamaradoj, povos fari servon al ni — se vi loĝas en urbo, kie aperas Esp. gazeto (krom en Hamburgo, Berlino, Parizo kaj Moskvo), tiuokaze atentigu ĝian administracion, ke de nun ili sendu al... vi scias. Se la administracio de nia Revuo farus tion, eĉ per simpla poŝtkarto, tio kostus manpleno da moneroj, kaj verŝajne havus nenium rezultaton (ekzistas, Esp. gazeto, kiu anoncas adreson, de kie la antaŭa administranto jam de du jaroj transloĝis!)

En la antaŭa numero ni jam anoncis aperon de nova esperantsocialista gazeto, nome „La Kulturo”, gazeto de bohema laboristaro esperantista en Aŭstrio, en bohema kaj esperanta lingvoj, aperanta en Praha (adreso Robert Šáda, Praha II, Lipová ul. 8). Pri ĝia celo, ĝi diras en enkondukanta artikolo:

Unue ni estas socialistoj, poste Esperantistoj! Ni propagandas la lingvon internacian inter la bohema laboristaro, simple por doni al ĝi novan praktikan rimedon por senpera interrilato kun laboristaro de cetera mondo. Ni alportos al bohemiaj laboristoj multan originalon interesan, raporton pri

vivo kaj klopodo de fremdlandaj samecelanoj kaj samtempe ni informos la fremdulojn pri individuaj bezonoj de proletariato bohema.

Nia unua celo estas do la praktika eluzo de Esperanto en servoj de internacia socialismo.

Ni ĉiam intensive defendos la principon, ke la politika kaj kultura konvinko ne estas ĉe esperantisto afero privata kaj sensignifa, sed ĉiam ni proklamados, ke la vera esperantismo kiel maturiĝinta ideo povas esti nur parto de ĝenerala pensmaniero de la homo sincie progresema, antiklerikula, antinaciula, antimilitarista kaj socialista.

La unua numero enhavas i. a. originalan artikolon de ĉefredaktoro de Bohema soc.-dem. organo „Právo Lidu” (Rajto de l' Popolo).

Ekzistas do nun vera socialistesperanta presaro — en Germanio „Antaŭen”, en Francio „La Laboristo Esperantista”, en Bohemio „La Kulturo”, dum ke en Holando sendube tre baldaŭ revivos jam ekzistinta laborista organo.

Korespondado.

K-do P. Asselin, 17 Rue des Chauffourniers en Paris (Francujo) dez. koresp. per ilustritaj poŝtkartoj kun tutmondaj Esperantistoj, precipe tiuj kiuj fabrikas vojaĝartikolojn.

K-do Augusto Heil, ĉapelisto, Basaltstrasse 39 en Frankfurt a/M. (Germanujo) dez. koresp. per poŝtk. aŭ leteroj kun gesamideanoj.

S-ro I. Udrik Narva, Rusujo, Sukonnaja manufaktura, d. N. 51-16 korespondas per il. poŝtkart., let., intersanĝas poŝtmarkojn.

S-ro W. Buck, estas beletristo, korespondas letere kun socialistoj de iu ajn lando, prefere kun samprofesiaj. Adresu: al S-ro I. Kespert, Narva, Rusujo N. Petr. f N. 53, por W. B.

Robert Bartels, Braunschweig, Germanujo, Madameweg 1 B/III, deziras intersanĝi il. poŝtk. kun ne-germanoj kaj ne-aŭstrianoj. Ĉiam respondas.

La kamaradoj de la lab. esp. grupo en Frankfurt a. M., Germanujo, treege deziras korespondadi. Sin turni al S-ro Jean Roth, Wildungerstrasse 21, Frankfurt a. M., Germanlando.

K-do J. W. Barraclough, Hairdresser, M. Eden Rd., Auckland, New Zealand, deziras intersanĝi fotografajn (poŝtkarte) de si mem kun gekamaradoj de ĉiuj landoj en la mondo.

K-do Raimond, 11 rue Gossec, Paris, petas sciigojn de Coomans, Yamaga kaj Barraclough.

Georg Schnauer, meĥanikisto, Holshausen, Saksen, Germanio, deziras kor. kun ĝesp. tutmonde per il. poŝtk. aŭ per letero.

Adolf Schillingen, Aussere Hallichstrasse 140 H p., Leipzig—Gohlis, Saksen, Germanio, deziras kor. per il. poŝtk. aŭ letero.

Al k-do Gausman la numeroj estas regule sendataj — se li ne ricevis ilin, tio ne estas la kulpo de administranto.

Ĉu pastro Šerišev ne ricevis poŝtkarton de I. S. R? Ke li tuj sciigu.

(Bonulo), certe ne estis el tiu ĉi speco, ĉar oni diras, ke ĝi de longe jam ne vivas plu. Serĉu la veron!

Gazeto „Ĉas” miregas, ke „Právo Lidu” devas tiel longe atendi ion klarigon de kompetentaj flankoj. Ni estas tre scivolemaj, kie estas do, kie estas, tiu ĉi papago?

PENSOJ.

Ĉiufoje kiam kunvenas rumanaj kaj bulgaraj esperantistoj, ilia unua laboro estas saluti Carmen Sylva, la rumanan reĝinon. La alilandaj samideanoj certe jam multfoje legis ŝian nomon en esperantaj gazetoj aŭ aŭdis ĝin entuziasme elparolata. Kion do faris tiu ĉi virino, por meriti tian grandan dankemon, tiajn salutojn?

Aŭdu, se vi ne scias: ŝi diris kelke da simpatiaj vortoj pri nia lingvo kaj promesis ĝin lerni. Jen estas ŝia granda merito al nia movado. Do, ĝoju ni, esperantistoj, ke ŝi, vivante en lukso kaj komforto, ne zorganta pri sia pano ĉiutaga per ŝvito, dediĉis kelkajn momentojn el sia neokupata tempo por... ekpensi pri nia lingvo (ne ankoraŭ por *ellerni* ĝin).

En la sama lando, kie loĝas tiu ĉi glorata kaj tiom laŭdata reĝino, mi konas alian personon. Li estas laboristo-kaldronisto, kaj ankaŭ esperantisto. Kiam vespere, post la mortiganta taglaboro, li revenas hejmen faletanta pro lacego, li prenas la esperantan lernolibron kaj per avida legado li perfektigas siajn konojn.

Samtempe la reĝino ripozas de la taga *nenifarado* en komforta kanapo, laŭ la palaca moro kaj aranĝo. En ŝia kapo eĉ penseto ne venas nun preni la lernolibron kaj vidi, ke la infinitivo finiĝas per *i*.

La kaldronisto propagandas fervore je ĉiu paŝo: dum noktaj malfruhoroj li mem gvidas kursojn inter siaj kolegoj. Kiom da noktoj li maldormis en pensado pri la sukcesigo de la afero! Eble iaj naivanimoj ekpensus, ke la reĝino, se ne gvidas noktajn kursojn, almenaŭ ne forgesas Esperanton kaj admonas siajn ĉirkaŭulojn lerni ĝin. Ho, trankviliĝu kaj resobriĝu, ne faras ŝi tion.

La laboristo estas mokata de l' malvarma, indifera publiko; ĝi tamen ne kuraĝas moki ŝin. Lia agado alportas al li ĉagrenojn; ŝia esperantisteco alportas al ŝi gloron kaj honoron.

Kiam nemezureblan utilon li alportis al nia afero! Lin tamen la esperantistoj ne laŭdas, eĉ lian nomon ili ne aŭdis. En la historio de l' esperanta movado kelkaj naivuloj graslitere notis ŝian nomon!

Kia diferenco inter la agado, kia diferenco inter la rekompenco!

Kiam kunvenas esperantistoj, ili rapidas ŝin telegrame saluti — por ke ŝi rememoru pri ilia ekzisto. Sed lin? Kompreneble, neniu lin salutas.

Ĉi, senfama laboranto por la homaro, heroo en mallumo, ĉi, superhomo, kiu simbolas la nekredoblan laboregon de la simpla kaj nefama esperantistaro (ne de la gregoj) — ĉi meritas la plej profundan sinklinon de la tuta Esperantistaro!

Sofia.

H. D. ATANASOV.

En Hispanio vivis homo, kiu konis nur unu celon de sia laborema vivo: doni al sia nacio kiel eble plej

multe da bonaj, modernaj lernejoj. Sed, ĉar la roma klerikalismo estas ĉie la sama malamiko de klereco, la episkopo mensoge akuzis tiun homon por ribelado kontraŭ hispana ŝtato monarhia formo kaj kaŭzis, ke la milita juĝistaro kondamnis tiun tute senkulpan homon al morto. La homo estis nomata Francisko Ferrer.

Tiu viro estis esperantisto tre meritinda kaj lia kondamno estis nura juĝista krimo; preskaŭ tuta kultura mondo protestis kontraŭ la verdikto de l' juĝo, sed vane.

Tiam estis unu viro en tuta mondo, kiu povis — sole per streko de plumo, savi la vivon al la senkulpe kondamnita instruisto de hispana nacio. Tiu viro ankaŭ estis Hispano, ankaŭ esperantisto kaj estis nomata Alfonso XIIIa reĝo de Hispanoj; sed lia plumo la mortigon de Ferrer — permesis kaj krom la esperantistaj liberpensuloj *) neniam esperantista gazeto diris pri tio unu vorton....

Nun, post pli ol du jaroj, la senkulpeco de Ferrer kaj la malhoma kulpo de Alfons XIIIa estas juĝe pruvita; sed la esperantistaj gazetoj plue silentas pri Ferrer kaj „samideano” Alfons XIII kiel ĝis nun havas sur iliaj paĝoj preskaŭ sian propran rubrikon....

El „Kulturo.”

*) Kaj nia Revuo. RED.

Historia kalendaro.

MARTO (nova stilo).

1. 1863. „Publika respondo de Lasalle al la Leipzigaj laboristoj.
3. 1806. *Rossmässler, pioniro de l' demokratio en Germanio.
5. 1907. Malfermo de l' 2a rusa „Duma”.
6. 1877. †L. Jakoby. — 1855. Katastrofo en karvina karbomino (Aŭstrio). 350 viktimoj.
8. 1904. Kongreso en Berlino pri ŝirmado de hejmlaboristoj.
13. 1848. Revolucio en Vieno. — 1881. Mortigo en Peterburgo de rusa caro Aleksandro II per bombo, de Grinevecaj, Jeljakov, Risanov, Emeljanov.
14. 1883. †Karl Marx.
17. 1906. †Johano Most.
18. 1848. Revolucio en Berlino. — 1871. Komuno en Parizo.
19. 1911. Kongreso de soc. dem. virinoj en Germanio.
23. 1909. Fino de l' unua poŝtista striko en Parizo.
25. 1420. Venko de husita armeokondukanto Jan Zizka je katolika noblularo apud Sudoměr en Bohemio. — 1872. Kondamno de Bebel kaj Liebknecht je du jaroj malliberpuno, pro „ŝtatperfido”.
28. 1592. Jan Amos Komensky (Comenius), fondinto de nuna instruada sistemo, † en urbeto Naarden, Nederland.
29. 1826. *Wilhelm Liebknecht.
31. 1898. †Eleanor Marx—Aveling. — 1909. †Julius Seifert.